# Aliĝilo

Se iel eble, uzu la retan aliĝilon:
https://www.esperanto.de/luminesk-aligho

**Pliaj aliĝdatoj**

☐ Mi estas ordinara membro de Germana Esperanto-Asocio (GEA)
**Atentu:** Se vi loĝas en Germanio kaj NE estas ordinara GEA-membro, vi krompagas 30 €.

Mi volas manĝi
☐ ankaŭ viandon ☐ vegetare ☐ vegane

Mi preferas ☐ dulitan ☐ unulitan ĉambron
☐ partoprenon sen tranokto

| Jeno rajtas aperi en la listo de aliĝintoj: | | |
|---|---|---|
| | en la retpaĝo: | ☐ nomo kaj retpoŝta adreso |
| | | ☐ nur nomo ☐ nenio |
| | en la broŝuro: | ☐ nomo kaj retpoŝta adreso |
| | | ☐ nur nomo ☐ nenio |

Mi antaŭpagos 50 € per ☐ IBAN-ĝirado ☐ UEA-Konto

ĝis plej malfrue la ______-a de __________________ 2023

Dum la eventoj povas esti farataj fotoj, kiuj povas esti publikigataj en nia asocia revuo, en retpaĝoj kaj/aŭ en sociaj retoj. La organizantoj ne transprenas respondecon ĉu unuopaj partoprenantoj estas videblaj en fotoj.


Deutscher Esperanto-Bund e.V.
Esperanto-Laden
Katzbachstraße 25
10965 Berlin

Faksilo: +49 30 4193 5413


# Kotizo kaj organizantoj

| kotizo por ĉambro | ĝis 2023-08-23 | ĝis 2023-10-31 | poste |
|---|---|---|---|
| dulita | 595 € | 620 € | 650 € |
| unulita | 750 € | 770 € | 800 € |

Necesa antaŭpago por validigi la aliĝon: 50 €

La **kotizo** inkluzivas la restadon de la 27-a de decembro 2023 vespere ĝis la 2-a de januaro 2024 (atentu la ŝanĝitan okaziĝdaton 27.12.–02.01.) matene: loĝado en dulitaj ĉambroj, tri manĝoj tage, programo kaj silvestra bufedo. Partoprenantoj loĝantaj en Germanio, kiuj ne estas ordinaraj membroj de Germana Esperanto-Asocio, krompagas 30 eŭrojn.
**Partatempa partopreno** pro restrikto de la domo ne eblas. Laŭbezone organizu propran tranokteblecon por partopreno kiel taga gasto. Tagaj gastoj pagas 50 Eurojn, inkluditaj estas la programo kaj tri manĝoj.

**Kiu respondecas pri la renkontiĝo?**

Kiel en la pasintaj jaroj la ĉefa respondeculo estas Andreas Diemel el Duisburg. Volonte vi povas alparoli lin ĉiam kaj demandi pri detaloj: demandoj@luminesk.de aŭ per telefono ene de Germanujo: 0800 3 36 36 36 64 (senkosta) aŭ internacie: +49 203 2964 877 (fiksreta, kun alvokrespondilo).

**Organiza teamo**

Andreas Diemel (kunordiganto)
Barbara Brandenburg (administrado)

**Pago**

Aliĝo validas nur per antaŭpago de 50 eŭroj
- al jena konto de Germana Esperanto-Asocio:
IBAN: DE53 5085 1952 0040 1158 42
(Sparkasse Odenwaldkreis)
BIC: HELADEF1ERB
- aŭ per UEA-Konto geaa-n.

Pagcelo: Luminesk' 2023/24 + via nomo

Bonvolu ĝiri la restsumon ĝustatempe antaŭ la komenco de la aranĝo.

© Deutscher Esperanto-Bund e.V. 2023

# LUMINESK'

*La silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio*

***27-12-2023 – 02-01-2024***
***Norderney/Germanio***






# Pri LUMINESK’

### Kio estas LUMINESK’?

LUMINESK’ estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi nun okazos la okan fojon kiel Luminesk’. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertos varian kaj altkvalitan programon – lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7 ĝis 8 landoj.



© Caritasverband für die Diözese Osnabrück / Friesenhof Norderney

# La loko

### Kie estos tiu renkontiĝo?

La **Orientfrisaj insuloj** situas 5 ĝis 10 kilometrojn norde de la kontinento, inter la enfluejoj de la riveretoj Emso okcidente kaj Jade oriente, kaj apartenas al la germana federacia lando Malsupra Saksio. La sep loĝataj insuloj estas (de okcidento al oriento): Borkum, Juist, Norderney, Baltrum, Langeoog, Spiekeroog kaj Wangeroge. Nia aranĝo okazos sur Norderney, la due plej granda insulo de la Orientfrisaj insuloj. Ĝi estas 27 kvadratajn kilometrojn granda kaj havas sesmil daŭrajn enloĝantojn, aldone pli ol duonan milionon da turistaj gastoj. Ekde 1797 ĝi estas ŝtata banejo kaj kuracloko. En la urbomezo situas multaj butikoj por la ĉiutaga bezono de turistoj kaj restaŭracioj. Multaj turistoj, ankaŭ el la proksimaj grandurboj, gastas sur la insulo. Pro la kreskanta turismumado de riĉuloj oni parolas pri „la dua Sylt-insulo“. De Norddeich Mole oni povas atingi la insulon per pramŝipo ene de malpli ol unu horo. 85 procentoj de la insulo estas parto de la Nacia Parko Malsuprasaksia Vadomaro. La plej konata planto de la insulo estas la oranĝbera hipofeo.

### La domo

La *Inseloase* (insuloazo) estas porfamilia feridomo de la asocio Caritas. Ĝi situas inter la haveno kaj la rando de la urbo Norderney. La domo estas ekipita kiel tipa frisa insula domo kun kaĥeloj kaj lignaj ornamaĵoj. En la Inseloase haveblas unu- kaj dulitaj ĉambroj kun banejo en diversaj komfortstatoj. La ĉambroj estas disdonataj laŭ tempo de aliĝo. La plej rapidaj aliĝintoj ricevas la plej komfortajn ĉambrojn. Lifto uzebla. Vintra ĝardeno ebligas ripozadon en varmeco.

## Programskemo

| tempo / tago | 27-12 (mer) | 28-12 (ĵaŭ) | 29-12 (ven) | 30-12 (sab) | 31-12 (dim) | 01-01 (lun) | 02-01 (mar) |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 07:00–09:15 | | matenmanĝo | | | | | |
| 09:15–10:45 | | programbloko 1.1 | | programbloko 3.1 | programbloko 4.1 | programbloko 5.1 | **adiaŭo** |
| 11:00–12:30 | | programbloko 1.2 | | programbloko 3.2 | programbloko 4.2 | programbloko 5.2 | |
| 12:30–13:30 | | tagmanĝo | **ekskursoj** | tagmanĝo | | | |
| 14:00–15:30 | | programbloko 1.3 | | | programbloko 4.3 | **novjara promeno** | |
| 15:30–16:00 | | kafopaŭzo | | **ekskurso** | kafopaŭzo | | |
| 16:00–17:30 | **akcepto** | programbloko 1.4 | | | programbloko 4.4 | programbloko 5.4 | |
| 18:00–19:30 | vespermanĝo | | | | **silvestra bufedo** | vespermanĝo | |
| 20:00–21:30 | interkona vespero | vespera programo | | | **silvestra balo** | vespera programo | |
| poste | gufujo / trinkejo | | | | | gufujo / trinkejo | |

# Aliĝilo

Se iel eble, uzu la retan aliĝilon:
https://www.esperanto.de/luminesk-aligho

### Jen mi aliĝas al la 8-a LUMINESK’!

Persona nomo:

Familia nomo:

Adreso/Strato:

Naskiĝdato (tt.mm.jjjj):

Sekso ☐ vira ☐ ina ☐ alia

Adreso/Poŝtkodo, Urbo:

Loĝlando:

Retpoŝtadreso:

Telefono fiksa:

Poŝtelefono:

Dato/Subskribo:

☐ Mi legis la Deklaron pri datumprotekto kaj konsentas. Detalojn oni povas vidi en la retpaĝo luminesk.de aŭ peti per telefono ĉe respondeculoj.

☐ Per mia subskribo mi konsentas esti fotata, kaj la foto povu aperi publike.

**LUMINESK’ 2023/2024**